

N. N. 52,

## Monastera kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Kie fluas lante Verso tra l' kampar',<sup>3</sup>  
 kie blonda estas ina kap-harar',  
 kie oni glutas multe da bier',  
 tie estas mia hejmalanda ter'.

Kie blovas nokte de l' Lamberta tur'  
 la gardist' kaj sonas sonoriloj nur,  
 kie preskau ĉiam estas pluv-veter',  
 tie estas mia hejmalanda ter'.

Kie promenadas sur la foirej'  
 Belulinoj kaj en la bier-gastej'  
 trinkas la bieron de l' urb' Monaster',  
 tie estas mia hejmalanda ter'.

Kiel laŭte vokas foirej-virin'  
 kaj ŝip-veturado amuzigas nin,  
 kie povas studi en kastelo vi,<sup>4</sup>  
 tie naskiĝinte estas hejma mi.

...

---

<sup>3</sup>„Verso“, germane „Werse“, estu la Esperanta nomo de la rivero, kiu fluas ĉe la urbo Münster en la pli grandan riveron Amiso, germane: „Ems“.

<sup>4</sup>aŭ:

kie oni povas studi en kastel',  
 tie estas mia hejmalanda ter'.

Kie inon amas oni eĉ dum jar',  
kie brandon trinkas tuta urbanar',  
ebriulojn punas oni kun sever',  
tie estas mia hejmalanda ter'.

Kie biciklanta estas ĉiu hom',  
kaj ne volas resti en la propra dom',  
tie mi eliras, tie restas mi;  
ĉar mi vere ŝatas tiun urbon ĉi.

*Traduko de la Germana poemo "Münsterlied" de N. N. 52 en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-806-1617 (2013-01-31 21:47:21)*

*Kantebla estas la poemo laŭ la melodio de la konata plat-germana kanto „Mine Heimat“ de Martha Müller-Grählert. Vidu la retejon [http://www.felix-krause.de/mine\\_heimat.htm](http://www.felix-krause.de/mine_heimat.htm)*